Fine, denove mi mencias ke ĉi-jare estas la 100-jariĝo de lia naskiĝo kaj ĝuste pro tio UEA rekomendis ke esperantistoj tra la mondo dediĉu agadojn rilate al tiu persono kaj multaj landoj oni nun prepares programojn por omaĝi honore al li. Ekzemple oni planas eldoni lian libron "Kumeaŭa la filo de la ĝangalo" ankaŭ en korea, kataluna, slovana kaj kroata lingvoj. Do, estas kvar tradukoj preparita ĉi-jare. Kaj en Akonkagva, en Argentino, esperantistoj tie planas okazigi omaĝ-programon por li. En serbio, kie li vivis kaj finis sian profesian karieron, en tiu urba muzeo kaj kie situas ankaŭ lia tombejo, oni planas okazigi specialajn programojn. En slovenio, oni dediĉas la tutan aktivadon de tiu ĉi jaro al liaj agadoj kaj organizas rondajn tablojn kaj prelegojn tie. Do, tio estas ankaŭ kion ni povis fari omaĝe al li.

**Rimarkoj:**

Post tiu ĉi prelego, mi



ricevis mesaĝon de Djordje Dragojlovich ĵurnalisto (kaj delegito de UEA) el Subotica, Serbio, kie Tibor vivis dum longaj jaroj, kie li estas entombigita. Djordje volis ke mi sendu la tekston de la prelego al li, kaj tion mi faris. Poste mi ricevis de li la suban mesaĝon:

**"Hodiau mi ricevis tekston de via prelego, en kiu estis ankaŭ via foto. Koran dankon! Mi gardos la tekston en la dokumentaro, sed mencio pri ĝi aperos post kelkaj tagoj en interreta magazeno kiun mi redaktas, wwww.diurnarius.info Se vi permesas, en la artikolon mi enmetos ankaŭ vian foton.**

**Kun ĝojo mi kvitancas ke ankaŭ en Irano oni rememoris Tibor, okaze de la datreveno de lia naskiĝo. En la arkivo mi enmetos la tekston tiel kiel mi ricevis ĝin de vi... Tamen, permesu al mi diri, ke en ĝi estas kelkaj misaj informoj (ekzemple, lia patro ne enmigris al Argentino, dum la Dua**

**mondmilito li estis enkarcerigita kaj pereis, kun preskaŭ la tuta familio, krom Tibor, lia frato Antonije kaj filino de ilia fratino). Se vin eventuale interesas, mi povus vin informi pri tiuj misaĵoj, pro kiuj vi, memkompreneble, ne kulpas -- okazis ech ke UEA dissendis informon kun eraraj detaloj pri li!)."**

Do, tiun mesaĝon mi metis tien ĉi, ĉar la informoj estas gravaj por korekti miajn erarojn en la prelego. Responde al Djordje, mi sendis la suban retpoŝtaĵon kaj reicevis la respondon kiun ambaŭ mi metas tien ĉi por kompletigi la artikolon.

Jen mia mesaĝo: ***"…Dum mia serĉo por informoj pri Tibor, mi notis ke li iam estis en Irano, sed nenie mi trovis informojn pri ajna lia agado aŭ mencio pri lia resto en Irano. Kaze ke vi eble havas informojn pri tiu afero, mi estus ege dankema ricevi informojn pri tio. …"***

Kaj la respondo de Djordje:

**Laŭ mia scio, Tibor nur en sia libro "Mondo de travivaĵoj", en ĝia unua ĉapitro, skizo por aŭtobiografio anstataŭ antaŭparolo, menciis vojaĝon tra Irano. Temas pri nur kelkaj frazoj, jen mi citas ilin:**

**Sed jam en printempo de 1956 denove mi estas survoje. Ĉi-foje per aŭtomobilo tra Azio. Mia celo estas Novdelio, kie en oktobro mi devis partopreni la laboron de la ĝenerala konferenco de Unesko, kiel observanto de Universala Esperanto-Asocio. La fakto ke mia veturilo plene difektiĝis en Irano ne tro ĉagrenis min. Forlasinte ĝin en garaĝo en Teherano, mi daŭrigis kun kunvojaĝantino f-ino Parson per aŭtobuso kaj fervojo, por atingi ĝustatempe Novdelion.**

**Jen tio estas ĉio. Mi legis ie ke sinjorino Parson (ŝajne plurfoje) prelegis pri tiu vojaĝo, sed pliajn detalojn mi ne konas. Povas esti ke ankaŭ Tibor iam prelegis pri tio (ekzemple: "Fakaj kunvenoj" (de la 53-a UK en Madrid): "Geografoj" - Heroldo de Esperanto n-ro 1456 -1457, jaro 1968, paĝo 3 - prelegis Tibor Sekelj pri "De Istambulo ĝis Pekino" kun lumbildoj), sed tio estas ĉio kion mi scias. Nenion pri ajna lia agado en Irano, eĉ ne pri la sorto de lasita aŭtomobilo… .**




**TAGAJ NOVAĴOJ MALLONGE-KAJ PER VOĈO KAJ PER TEKSTO!**

Kio estis la ĉefaj novaĵoj hodiaŭ en la mondo? - je tiu demando faras respondon Maximiliano Catania el Argentino, redaktoro de novtipa jutuba novaĵservo!

Jam de pluraj monatoj li ĉiutage resumas en E-o la plej gravajn novaĵojn en 1.5 minuta aŭd-vida kompliaĵo per jutuba filmeto: oni vidas frapfilmeton (kiel en televido), aŭdas la novaĵojn (kiel en radio), kaj sub la filmeto oni povas ankaŭ legi la voĉlegitajn tekstojn, kiu povas multe helpi la komencantojn.

Tiuj aŭdvidaj tagaj novaĵoj estas spekteblaj en propra kanalo de Youtub ĉe http://www,youtub.com/user/mxcatania/feed?filter=2

Maximiliano Catania produktis jam pli ol 100 novaĵ-registraĵojn, kiujn oni povas spekti laŭ diversaj enhavkategorioj: e-o novaĵoj, sportaj novaĵoj, novaĵoj por muziko, novaĵoj de BBC, ktp.

La kompilaĵoj estas aŭd-videblaj ne nur en la jutuba kanalo, sed ankaŭ en la novaĵportalo RTE ĉe http://novjhoj.weebly.com/ kaj ankaŭ en Muzaiko.

**Szilvási László**

# Pri Persa Skribarto


„je ĉiu tagiĝo mi trinkas buŝplenon da amo“
Saadi (~1210 – ~1291):




**La persa belskribo (aŭ kaligrafio) estas la tradicio de arabskriba belskribo, kia ĝin interpretis artistoj de irano kaj najbaraj landoj.**

## Persa stilo

Post aliaj sistemoj, la araba skribo estis uzata en persio ekde la 7a jarcento. persaj artistoj kontribuis al la fruaj stiloj de tiu skribo: kufa, triona kaj aliaj. En la 14a jarcento Mir Abdola sintezis la rektajn formojn de la nasĥa stilo kun la kurbaj formoj de la divana stilo. li tiel iniciatis nacian stilon, kiun oni ordinare nomas persa stilo (perse kaj faklingve *nastaliĥ*).

Ĉi tiu stilo sin distingas per elegantaj, ovoformaj kurboj, kaj ioma klino al malantaŭo (tio estas, en almaldekstra skribo, klino al la dekstra flanko). Ĝi estas konata en ĉiuj arabskribaj landoj, sed aparte flegata en Irano kaj najbaraj landoj, kaj ankaŭ estis en turkio antaŭ la ŝanĝo al latinida skribo.

## Flua persa stilo

La flua persa stilo estas malformala, rapidigita formo de la persa stilo (perse *ŝekasteh* tio estas (regul)rompa). Ĝi estiĝis en la 17a jarcento. En ĝi la kurboj malfermiĝas, kaj la literformoj kunfluas. Ĝi estas malfacile legebla.

## Enpaĝigoj, ĝenroj, ecoj

Persaj belskribistoj volonte metas la liniojn oblikve sur la paĝo, aŭ eĉ iom impertinente skribas renverse, turnante la folion. popularas *nigra etudo*, ekzerco en kiu oni nigrigas la paĝon, skribante senorde en ĉiuj direktoj, eventuale en diversaj grandoj.

Aliflanke persa arto tre atentas etajn detalojn. ĉiuj literoj ricevas precizajn grandojn laŭ mezurpunktoj, kaj interadaptiĝas per apenaŭ videblaj modifoj. La plej prestiĝa kaligrafia ĝenro, laŭnome *ĉalipo*, konsistas el kvar duonversoj oblikve skribataj laŭ tre strikta enpaĝiga ŝablono.

La persa librarto volonte kunmetis kaligrafion kaj miniaturon, du grafikajn artojn de precizo kaj eleganto en malgranda formato.

De: http://eo.wikipedia.org/wiki/Persa_kaligrafio



## Abdollah Kiaie

Naskiĝis en Tehrano en marto 1954. Li komencis kaligrafion en subtena medio hejmen al "la litero". Kun lia avo en la aĝo de kvin jaroj antaŭ sekvi la instruadon de la majstro kaligrafoj Amirkhani kaj aliaj ... Tiel, ĝi kondukas al akiri la gradon de kaligrafio persa kaj araba.

Antaŭ lia alveno en Francio en 1987, li laboris en Irano kiel kalígrafo kaj grafika dezajnisto en diversaj institucioj kaj organizoj (inkludante la irana televido), kaj instruis samtempe en la irana kaligrafoj Asocio (ĉefa korpo de la kaligrafio en Irano).

En Francio, li daŭrigas instrui Persan kaligrafion, dum daŭre siajn studojn en grafikaj artoj kaj esploro en la ĉina kaligrafio, latino, en la kampoj de pentrarto kaj praktikoj.

En 1991, li estis unu el la fondintoj de la asocio ductus por promocii kaligrafion en Francio.

Abdollah Kiaie regule elmetas liajn verkojn ekde 1988, dum maniestacioj persona aŭ

kolektiva, kies lasta en Bruselo, Parizo, Luxemboug ...

Ĝi havas multajn profesiajn kaj edukaj aktivecoj: atingoj de malsamaj ordoj de kaligrafio, kuraĝigo trejnado (speciale por instruistoj de arto), dum regula persa kaj araba kaligrafio, manifestacioj, konferencoj, laborgrupoj en diversaj institucioj, bazlernejo arto lernejoj ...




S-ro Herman Deceuninck prezentis al ni la retpaĝaron pri la Persa Skribarto: http://persaskribarto.free.fr/index.htm


Ĵeromo Vaŝe redaktis kaj enpaĝigis ĝin. La enhavo resumas la instruon de Abdollah Kiaïe, de kiu vi povas vidi aliajn (malpli formalajn) verkojn en kelkaj retejoj: http://a.kiaie.monsite-orange.fr/ ,

# Zamenhof-Tago La plej intima




Vendrede la 23a de decembro okazis tiu festo en la oficejo de IREA. Pli ol 20 esperantistoj patoprenis. La etoso estis tre ĉarma kaj la plej plaĉa dum la pasintaj 2-3 jaroj. Irana ĉefedelgito, A. R. Mamduhi, prezentis sian persan Powerpoint-prezentaĵon pri Esperanto. Oni povas uzi tiun ampleksan prezentaĵon por varbi nian lingvon inter perslingvanoj. Mi prelegis pri la poemlibro "La rakonto pri Kieŭ". Poste samideanoj H. Shafii kaj S. Emrani parolis pri asociaj aferoj inkluzive de baldaŭa voĉdono por IREA-komitato kaj la revuo "Irana Esperantisto". Bankedo estis la lasta programero. Fotojn ankau troveblas sur nia retejo: *www.espero.ir*





**Dr. K. Sayadpour**







# Komparo inter la Persa kaj E-o
## (Memore al Ahmad Kasravi)



Omid Rohanian




Multe estas jam dirita pri grandeco de literatura trezoro de la persa lingvo, ĝia beleco kaj aliaj virtoj. Sed ni ĉiuj konsentus, ke jam venis la tempo kiam ni analizu nian karan lingvon el realisma kaj scienca perspektivo kaj determinu ĉu ĝi konvenas al la bezonoj de nia nuna socio. Ni devas trovi la eblajn mankojn en nia lingvo kaj elpensi metodojn por solvado de ĉi tiuj problemoj.

Unu el la karakterizaĵoj de iu ajn lingvo estas ĝia genera povo aŭ nivelo de kreemo. Oni povas studi la kreemon de lingvo laŭ multaj aspektoj (el literatura, sintaksa, vortara kaj aliaj vidpunktoj). Tie ĉi ni sole interesiĝas pri lingva kreemo ene de la vortara sfero. Alivorte, ni analizas la manieron laŭ kiu la persa lingvo formas siajn novajn vortojn. Produktado de novaj vortoj helpas al la lingvo adapti sin al la bezonoj de la ĉiame-ŝanĝiĝanta socio kaj ĝisdatigi sin harmonie kun pasado de tempo.

Laŭ lingvistika terminologio, ĉi tiu flanko de lingvo estas klasifikita sub vortfarado aŭ derivado. En simplaj vortoj, derivado temas pri farado de nova verbo el la ekzistanta substantivo aŭ adjektivo, aŭ farado de substantivo aŭ adjektivo el verbo, ktp. Kun iom da neprecizeco, oni povas diri ke derivado signifas iradon de iu gramatika kategorio al alia.

Do, se ni volas mezuri la generan potencon de lingvo kaj kompari ĝin al aliaj lingvoj, ni devas informiĝi pri la grado de facileco, kun kiu oni povas iri de iu gramatika kategorio al alia. Inter diversaj metodoj por derivi novajn vortojn, la plej grava estas konstruado de verboj el substantivoj aŭ adjektivoj. La kialo estas tio, ke verbo mem havas generajn eblojn kaj oni povas akiri multajn novajn vortojn per ĝi.

Ekzemple ni povas rigardi al la vorto "penso" en Esperanto kaj vidi kiel la verbo estas evoluigita kaj kiom da novaj vortoj povas esti formitaj rekte de ĝi:

**Substantivo: Penso**
**Verbo: Pensi**

Kelkaj vortoj kiuj devenas de la verbo: pensado, pensigi, pensiga, pripensi, pripensado, nepensebla, senpripensa, antaŭpensi, ekpensi, elpensi, elpensinto, pensisto

Kiel klare videblas en la ekzemplo, irado de substantivo al verbo okazas glate; kaj pro uzo de afiksoj, multaj novaj vortoj formiĝas. Tio estas la normo en Esperanto.

Nun ni povas reveni al la persa kaj vidi kiel

la sistemo funkcias tie. Unue mi resume listigas la punktojn kaj poste pli detale klarigos pri ĉiu.

1) En la persa, nur la simplaj verboj (verboj kun unu radiko) havas la potencialon por derivado.

2) En la moderna persa, oni ne plu povas konstrui novajn simplajn verbojn. Alivorte, novaj verboj kiuj estas formitaj en la moderna persa ne kapablas fari adjektivojn kaj substantivojn.

3) La nombro de tiaj simplaj verboj kiujn ni heredis de pasinteco estas tre malgranda.

4) Ene de ĉi tiu limigita kvanto, multaj verboj baldaŭ fariĝos neuzataj, se ne jam ekstere de uzo. Ilin anstataŭos kombinaĵoj. En la persa, tiaj verboj estas "senelirejoj" ĉar mankas al ili la derivada trajto.

La rezulto estas tio, ke la persa lingvo ne havas problemon plenumi niajn ĉiutagajn bezonojn, tamen tia lingvo, en la aktuala stato, maltaŭgas por esti la lingvo de scienco, en kiu la kapablo produkti novajn terminojn kaj vortojn estas plej grava.

En la cetero de la prelego, mi provos amplekse pritrakti la jam-menciitajn aferojn, kaj fine prezentos ideojn por solvi la problemon.

1) Kiel mi antaŭe diris, en la persa nur simplaj verboj kapablas fari derivaĵojn. Pruvo de ĉi tio estas tre facila. Por ekzemplo, konsideru la vorton "نمودن" (nemudan) kiu signifas "montri(ĝi)". De ĉi tiu vorto ni povas akiri kelkajn derivaĵojn:

نمود، نمودار، نموده، نما، نمایان، نمایش، نماینده

Nemud, nemudar, nemude, nema, nemajan, nemajeŝ, nemajande

Kaj ankaŭ aliaj duarangaj derivaĵoj kiuj estas faritaj per plukombini la derivaĵojn kun aliaj afiksoj:

نمایندگی، نمایشگاه، نمایشنامه، نمایشی

Nemajandegi, nemajeŝgah, nemajeŝname, nemajeŝi

Malgraŭ tio, en la moderna persa, la verbo "نمودن" estas tre malofte uzata en sia originala signifo; kiel ekzemple en la fama verso de poeto 'Sadi':

دیدار می‌نمایی و پرهیز می‌کنی

بازار خویش و آتش ما تیز می‌کنی

Anstataŭ la transitivan signifon de نمودن oni nun uzas la kombinaĵon "نشان‌دادن" (neŝan dadan) kaj ĝia netransitiva signifo estas anstataŭigita per "به‌نظر آمدن" (benazar amadan) kaj "به‌نظر رسیدن" (benazar residan) sed tiaj kombinaĵoj estas senfruktaj kaj ne donas la eblecon por produktado de derivaĵoj.

Ni notu, ke se jam de la komenco, nia lingvo montrus la saman emon konstruadi malsimplajn verbojn anstataŭ derivi verbojn el substantivoj, neniu el la jam menciitaj derivaĵoj de la verbo "nemudan" nune ekzistus.

Por alia ekzemplo konsideru la sinonimajn verbojn "فریفتن" (fariftan) kaj "فریب دادن" (farib dadan). Ambaŭ signifas "trompi". La unua estas malnova simpla verbo kiu estas maolfte uzata. La dua estas duparta kombinaĵo kiu ofte uziĝas en la moderna persa. Kompreneble ne eblas akiri derivaĵojn el la dua verbo. Sed, ekzistas la jenaj vortoj faritaj el la unua:

فریفته، فریفتگی، فریب، فریبا، فریبایی، فریبنده، فریبندگی

Farifte, fariftegi, farib, fariba, faribaji, faribande, faribandegi

2) En la moderna persa, oni ne plu povas fari simplajn verbojn. Tio signifas, ke ne eblas fari verbojn el substantivoj aŭ adjektivoj. En la persa, la tendeco estas konstrui plurpartajn verbojn; kaj tiu sistemo uziĝas por farado de novaj konceptoj. Necesas kelkaj ekzemploj por ke la afero fariĝu kristalklara:

En la angla oni faris la verbon "to telephone" el la nomo de la aparato "telephone". Same okazis en la franca kaj uziĝas la vorto "téléphoner". En Esperanto, oni tutsimple faris "telefoni" el telefono. Sed kion ni faris en la persa? Ni konstruis la kombinaĵon "تلفن‌زدن" (telefon zadan). En Esperanto oni povas fari "telefonisto" el telefoni kaj tiel akiri alian vorton. Sed en la persa, "تلفن‌زدن" estas malfruktodona el la vortfarada vidpunkto.

De la vorto "filozofio" oni faris filozofi/ filozofii kiu signifas "rezoni filozofie" aŭ "esplori kaj pritrakti filozofion". Oni faris same en la angla per "philosophise" kaj en la franca per "philosopher". En la araba oni prenis la

vorton "فلسفه" (falsafe) kaj faris verbon el ĝi: تفلسف، يتلفز (jotalfezo, tafalsof). Sed en la persa ni diras "فلسفه‌پرداختن" aŭ "به فلسفه‌پرداختن". Denove kombinaĵo. Kiam irana filozofo d-ro Human Sadr en siaj skribaĵoj faris la simplan verbon "فلسفيدن" (falsafidan), multaj akademianoj protestis kaj asertis ke la termino estas malbonsona kaj ŝajnas kontraŭ-intuicia.

Jen alia ekzemplo: En la angla oni faris la vorton "polarize" el la adjektivo "polar". En Esperanto oni faris polarigi kaj polarizi depende de la scienca signifo. En la persa ni uzas "قطبی‌کردن" (kotbi kardan). Iuj provis uzi la simplan verbon "قطبیدن" (kotbidan) el kiu oni povas derivi multajn novajn vortojn. Sed la plimulto de la kleruloj ne akceptis tion, nomante ĝin "falsa infinitivo" kaj ĉiujn ĝiajn derivaĵojn kiel "falsaĵoj".

Kiel evidentas en la ekzemploj, kiam mi uzas la vorton "kombinaĵo" rilate al verboj, mi priparolas nur tiujn verbojn kiuj formiĝas per kombinado de du aŭ pli da vortoj. Tio ne inkluzivas utilajn verbojn kiuj uzas afiksojn.

Do, mi pensas, ke la ekzemploj klare montras, ke en la persa ni emas fari kombinaĵojn, kaj ke ni rezistas kontraŭ la originala sistemo de la persa en kiu simplaj verboj kreiĝis el substantivoj kaj rezultis je multaj derivaĵoj.

3) La nombro de la simplaj verboj kiujn ni heredis el niaj prapatroj estas malmultega. D-ro Ĥanlari, en sia libro "Historio de la persa Lingvo", listigas ĉiujn simplajn verbojn kiuj estas ankoraŭ uzataj, "inkluzive de la vortoj kiuj foje aperas en skribaĵoj kaj ankaŭ tio, kio uziĝas en parolado."

Entute, troviĝas nur 277 verboj en la listo. Sed se oni pli precize rigardas al la listo, evidentiĝas, ke multaj vortoj nenie uziĝas en la moderna persa. Vortoj kiel:

غارتيدن، آهيختن، اوباشتن، بسودن، چميدن، خستن

karatidan, ahiĥtan, obaŝtan, besudan, ĉamidan, ĥastan

Efektive, la vera nombro estas multe malpli ol tio. En tri apartaj esploroj en Universitato de Teherano, studentoj provis trovi ĉiujn simplajn verbojn kiuj uziĝas en amaskomunikiloj kaj en ĉiutaga parolado. La plej alta nombro kiun ili atingis estas 115.



Se ni malzorgeme kalkulas la malpli uzatajn verbojn, maksimume la nombro estas inter 150 ĝis 200. Tio signifas ke en la persa, nur 200 verboj kapablas produkti derivaĵojn. Katastrofo, ĉu ne?

En la piednotoj de la sama libro, li skribas 'Komparu ĉi tion kun la nombro de verboj en la franca, kiu estas 4160'.

En la angla, fari verbojn el substantivoj estas relative simple. En la vortaro 'Random House', oni povas trovi 16 verbojn sub la vortoj kiuj komenciĝas per la prefikso tele. Ĉi tiuj verboj havas siajn proprajn derivaĵojn:

*Telecast, telecommunicate, telecommute, teleconference, telegram,telegraph, telemeter, telepathize, telephone, teleport, telescope, teleshop, teletype, teleview, televise, telex*

Se ni prenas tion kiel la normon en la angla, ni povas diri ke la tuta nombro de tiaj verboj estas proksimume 23000.

La afero fariĝas ege interesa kiam ni komparas Esperanton kun la persa. Sendube Esperanto estas produktema kaj uzas iun koheran sistemon por vortfarado. Interese, la sama trajto kiu malhelpas al la persa krei derivaĵon, donas al Esperanto grandan potencon: Kombinado.

Kunmetitaj verboj estas ege utilaj en Esperanto; kaj la kreemo de la lingvo restas en ili. Sed kio estas la diferenco de kunmetitaj verboj inter la persa kaj Esperanto? La diferenco estas en strukturo de verboj. En la moderna persa, novaj verboj kreiĝas per la jena metodo:

Substantivo-plus-verbo [la verbo estas ofte "کردن" ('kardan': fari)].

La verbo nomiĝas "malpeza verbo" (angle "light verb") en lingvistiko. Ĝi apenaŭ havas sian propran semantikan enhavon, kaj nur uziĝas por formado de verbo el la substantiva parto. Ĉi tio estas la sola parto de la verbo kiu estos konjugaciita. Ni vidas similan fenomenon en la frazaj verboj (=phrasal verbs) en la angla. Verboj kiel "go up" (supreniri) aŭ "ask around" (demandi al ĉiuj). La diferenco estas tio, ke la angla ankaŭ vaste uzas kunmetitajn vortojn faritajn el afiksoj, sed en la persa la ĉefa emo estas ĉi tiu formo, kaj uzado de afiksoj por kreado de novaj verboj, almenaŭ en

la skribita formo, nur malofte okazas.

Oni eble demandas al si pri la kaŭzoj de la nova tendeco en la persa. Kial en la moderna persa, anstataŭ fari simplajn aŭ kunmetitajn vortojn, ni uzas kombinaĵojn per malpezaj verboj? La kialo estas parte historia. Kiam araboj konkeris Iranon, ili perforte instalis sian lingvon ĉi tie. Sed irananoj rezistis. Kun paso de tempo, multaj fremdaj arabaj vortoj eniris la persan. Ĉar irananoj neniam akceptis tute ŝanĝi sian lingvon, ili provis persigi la fremdajn vortojn kaj fari verbojn el ili laŭ persa stilo. Do, ŝajnas nature ke ili kunmiksis arabajn substantivojn kun "malpezaj" verboj kaj faris kombinaĵojn. Sed tio iom post iom fariĝis uzata ankaŭ rilate al la persaj vortoj, kaj nun ĝi estas la ĉefa metodo por vortfarado.

Do, kiel videblas, la elementoj ne kungluiĝas en unu vorto, kaj la kombinaĵo konsistas el du apartaj vortoj. Sed en Esperanto la strukturo estas malsama, ĉar ne nur verboj kuniĝas en formo de unu vorto, sed ankaŭ afiksoj ludas gravan rolon kiam ili aldoniĝas al la radikoj.

Ĉi tiu trajto ekzistas en la kerno de la persa. Ĝi, same kiel Esperanto, estas aglutina lingvo (nur parte en la leksiko kaj ne en la gramatikaj kazoj), signfante ke ĝiaj vortoj estas formataj ĉefe per aldono de unusignifaj afiksoj. Sed nuntempe la trajto ne estas sufiĉe uzata en la vortfarado. Tio estas specife neglektita en farado de novaj verboj. Ahmad Kasravi estis la unua persono kiu konstatis tiun mankon. Li, kiu estis forte influita de Esperanto kaj ĝia vortfarada sistemo, klarigis pri tio en sia grava libro "زبان پاک" (La pura lingvo) en 1933. Bedaŭrinde multaj lingvistoj rilatigis la verkon al lingvistika purismo kaj tute malakceptis ĝin. Tamen, la influo de la libro en akademiaj rondoj kaj en multaj nove-aperintaj persaj vortoj estas evidenta. Mi pensas ke Kasravi estas la plej miskomprenita lingvisto en la historio de Irano. Kion li faris, estis pli ol nura provo por purigado de la lingvo. Li klasifikis ĉiujn afiksojn kaj montris la kapablon de la persa, kiam ĝi regule faras verbojn el substantivoj kaj uzas ĝiajn afiksojn senescepte; ĝuste kiel Esperato. Li fakte menciis d-ron Zamenhof kaj Esperanton en la antaŭparolo de sia libro. Tiu "purigado" pri kiu li parolis estis pli multa uzado de derivado kaj forlasado de neregulaj esceptoj en la gramatiko. Li opiniis , ke la persa devas funkcii ene de iu kohera vortfarada sistemo, kaj forlasu ĝiajn esceptaĵojn. Tiu pura, kohera, senescepta sistemo kiu inkluzivos ĉiujn aspektojn de la lingvo neniam okazos en la persa; kaj mi ne havas iluzion pri tio. Sed lia propono rilate al vortfarado estas ege trafa; kaj nuntempe grandaj lingvistoj kiel d-ro Mohammadreza Bateni rekomendas simile.

Se ni volas, ke la persa estu konvena por scienco, kaj ke ĝi reakiru sian potencon, ni devas facile fari verbojn el substantivoj per la sufikso ـیدن (idan) kaj ankaŭ laŭregule lasi ĝin krei siajn derivaĵojn. Ekzemple, kiam oni uzas قطبیدن ni devas scii ke tio estas tute ĝusta. Aŭ kiam en la interreto adoleskantoj uzas تلیدن (telidan: telefoni) aŭ چتیدن (ĉatidan: rete babiladi) ni ne moku ilin ĉar ili bone konscias pri la reguloj de siaj lingvo.

Por ŝanĝi la nunan staton, la bezono por lingvoplanado forte sentiĝas. Tio estas tasko de la registaro kiu povas multe influi la lingvajn tendecojn per amaskomunikiloj.

**Noto**:

1) Ahmad Kasravi estis ankaŭ malkaŝema kritikanto de religia superstiĉo. En 1943, li estis murdita en la plej maljusta kaj kruela maniero fare de religiaj fanatikuloj, dum li estis defendanta sin en la kortumo kontraŭ falsaj akuzoj. Lastatempe la registaro de Irano nomis unu el la ĉefaj metroaj stacioj laŭ la nomo de lia murdinto. Li estis unu el la unuaj iranaj Esperantistoj, kaj li fondis la unuan Esperantan asocion en Teherano. Li estas la unua irana lingvisto, en la moderna senco de la vorto.

2) Aglutineco estas relativa koncepto. Ekzemple, aglutineco de la persa estas 34%, angla 30% kaj Esperanto 99.9%.

3) Rilate al la vorto "telefonisto", fakte, ni havas la vorton "تلفنچی" (telefonĉi); sed "–ĉi" estas turka sufikso kaj la kunmetaĵo ne devenas de la verbo "تلفن زدن". Kiel mi antaŭe diris, la verbo mem estas senfrukta, kaj ne donas sian propran derivaĵon.

4) Mi uzis la jenajn fontojn:

- Lingvistikaj aspektoj de Esperanto (John Wells)
- Persa, ĉu senfrukta lingvo? (Mohammadreza Bateni)
- La pura lingvo (Ahmad Kasravi)






**Verkis: Nasrin Ghorbani**



**Elpersigis: Saeed Nami**

*Ĉi-nokte mi estingis kvindektrian vivkandelon, Kandelo klara kiel horizonto kaj varma kiel suno,*

*Ĉi-nokte, post kelkaj jaroj, mi akiris tempon por sole esti kun mi mem, kaj rigardi al la plej profundaj tavoloj de mia animo.*

*Kaj vidi ke mi estas nek printempo nek aŭtuno. Eble mi estas unua monato de la aŭtuno; tiu, kiu ankoraŭ tenas insiste branĉojn printempajn kaj ne kredas printempan foriron.*

*Sed mi bedaŭras, ĉar mi jam scias ke oni devas fari ĉi tiujn ŝanĝojn ĝis oni iĝos perfekta homo.*

*Kvankam la fruveninta vintro sidiĝis kelkajn jarojn pli frue sur miaj haroj! Sed ankoraŭ ili estas tiel belaj.*

*Ĝi sidiĝis kaj rememorigas al mi pasadon de la vivo; sciigante ke mi estas ne tiel juna por esti emociplena, kaj ne tiel maljuna por esti indiferenta pri estonto.*

*La vivo metis du kontraŭajn spegulojn vidalvide al mi, ke mi rigardu al la vizaĝo: jam ne plu tiom juna, kaj blankajn harojn, kaj mi memoru aŭtunajn tagojn.*

*Kaj mi ŝatas ĉi tiun spegulon. Ĉiam, kiam mi retiras miajn rememorojn, mi sentas la plej profundan bedaŭron en mia koro.*

*Mi kvazaŭ kutimus bedaŭri nehavaĵojn kaj ne scii la valoron de havaĵoj.*


*Kvazaŭ mi forgesus pasintecon, kiam mi estis deziranta edziĝi kaj plezuri la momentojn de familia vivo.*

*Sed hodiaŭ mi legis duonon de mia viv-libro. El ĉi tiu hasta legado, mi ne multe kontentas.*

*Mi jam forgesis, ke la koloroj de miaj sopiroj ŝanĝiĝas. Mi forgesis; hodiaŭ mi rigardis al la mondo tra la fenestro.*

# Proksimiĝantaj Psikologio kaj Mistikismo

Artikolo surbaze de prelego far Ahmad R. Mamduhi en 28a de majo 2012, en Irana Esperanto-Asocio (IREA), en Tehrano, Irano



***(la fina parto)***

## Malnovaj kaj Novaj Geviroj laŭ Zukav

Zukav distingas la "Malnovan Viron" (kvin-sensa, protektanta, provizantoa) kaj la "Malnovan Virinon" (kvin-sensa, infanoportanta, dommastrina), kiuj interligiĝas en geedziĝo por plialtigi probablecojn de pluvivado kaj komfortado, disde la emerĝanta "Nova Viro" (multsensa, intuicia, emocie konscia) kaj la "Nova Virino" (multsensa, kapabla en ĉiuj elektitaj klopodoj), kiuj interligiĝas en nova speco de rilato por krei aŭtentan potencon kaj helpi unu la alian por kreado de aŭtenta potenco. Li nomas tian rilaton "spirita partnereco" kaj difinas ĝin kiel "partnerecon inter egaluloj por la celo de spirita kreskado. " Laŭ Zukav, "spirita kreskado nun postulas rilatojn inter substanco kaj profundo"[1] kaj nur spiritaj partnerecoj povas apogi ĉiujn multsensajn individuojn (ne nur parojn) en kreado de aŭtenta potenco.

## Universala Homo laŭ Zukav

Kaj fine, Zukav vidas la "Universalan Humanon" kiel la finfinan potencialon de la emerĝanta multsensa humano – homo, kiu estas "super nacio, religio, raso, sekso, kaj ekonomia statuso; civitano de la Universo, kies fideleco/civitaneco estas al Vivo unue kaj al ĉio alia due."



## 5-3- Esther Hicks: Abrahamoj

Esther Hicks (naskita Esther Weaver) estas usona inspira preleganto kaj furoranta verkisto. Ŝi kun-verkis naŭ librojn kun sia edzo Jerry Hicks, prezentas atelierojn pri la Leĝo de Altiro[2] kaj aperis en la unua publikado de la filmo *La Sekreto*. La libroj de la Hicks-oj, inkluzive de la furoranta serio *La Leĝo de Altiro*, estas - laŭ Esther Hicks - "tradukitaj de grupo de ne-fizikaj unuoj nomitaj Abraham". (Hicks priskribas kion ŝi faras kiel frapetado en "senfina inteligenteco").



Esther kaj Jerry Hicks en 2007

## Instruoj de Abraham–Hicks

Esther Hicks diras ke ne-fizikaj uloj nomitaj Abraham parolas tra ŝi, kaj ke ŝiaj instruoj (referitaj kiel Abraham-Hicks-instruoj) estas bazitaj sur tiu sperto. La bazoj de la instruo inkludas tion ke:

1- Homoj kreas siajn realaĵojn tra siaj pensoj,
2- Emocioj konstante gvidas homojn direkte al kie ili volas iri,
3- Vivo laŭsupoze estas ĝojo.

- La esenco de la instruoj de Abraham-Hicksoj ekde 1986 estis prezentita jene:
- Individuoj estas fizikaj etendaĵoj de la ne-fizikaj.
- Homoj estas en siaj korpoj ĉar ili elektis esti.
- La bazo de vivo estas libereco; la celo de vivo estas ĝojo.
- Homoj estas kreintoj; ili kreas per siaj pensoj.
- Kion ajn homoj povas imagi estas ilia, por esti, por fari, aŭ por havi.
- Individuoj elektas siajn kreaĵojn samkiel ili elektas siajn pensojn.
- Emocioj indikas kion homoj estas kreantaj.

- La Universo adoras homojn; ĝi elscias iliajn intencojn.
- Individuoj devas senstreĉiĝi en sia natura bonfarto, kaj scii ke ĉio estas bone.
- Vivo ne devas esti lukto, sed procezo de permesado/lasado.
- Homoj estas kreintoj de "pens-vojoj" sur iliaj unikaj "padoj de ĝojo".
- Agoj kaj mono estas kromproduktoj de fokusado sur ĝojo.
- Individuoj povas foriri el sia korpo sen malsano aŭ doloro.
- Homoj ne povas morti; iliaj vivoj estas eternaj.

### *Sekreto: La Leĝo de Altiro*



William Walker Atkinson (1862 - 1932) estis advokato, komercisto, eldonisto, kaj verkisto, same kiel okultisto kaj usona pioniro de la Nova Penso movado.

Granda parto de la laboro de Hicks centriĝas ĉirkaŭ la Leĝo de Altiro[3], koncepto priskribita en la fruaj 1900-aj jaroj far William Walker Atkinson (1862-1932), en lia libro Pensa Vibrado[4] aŭ la Leĝo de Altiro en la Penso-Mondo (1906).

## 6- Mistikismo Emiĝanta al Scienco

En tiu ĉi parto ni pritraktos 3 nuntempejn sukcesajn mistikulojn, en kies verkoj ĉeestas ankaŭ sciencaj aŭ fizikaj ideoj/kredoj aŭ/kaj ilia metodo por montri/pruvi siajn starpunktojn kaj trovitaĵojn estas scienca. Estas tre interese ke ankaŭ iliaj verkoj jam tradukiĝis, eldoniĝis kaj eĉ instruiĝas en multegaj landoj tra la mondo. Probable unu kialo malantaŭ ilia populariĝo estas tio, ke la nuna popolo - pro sia scienca edukiĝxo - emas nur al tio, kio estas sciencmetode ellaborita kaj prezentata.

### 6-1- Mikao Usui: Rejkio aŭ Energi-kuracado



Mikao Usui (臼井甕男, 1865-1926, ofte *Usui Mikao* en la japana) estis la budhana fondinto de formo de spirituala praktiko konata kiel Rejkio[5] (霊気) en 1922, utiligita/ata kiel komplementa terapio por la traktado de fizikaj, emociaj, kaj mensaj malsanoj. Laŭ la surskribo sur lia memoroŝtono, d-ro Usui instruis Rejkion al pli ol 2000 homoj dum sia vivdaŭro. Dek ses el tiuj studentoj daŭrigis siajn trejnadojn kaj atingis la *Shinpiden*-nivelon, nivelo ekvivalenta al la okcidenta tria grado, aŭ Majstro/Instruisto-nivelo.



D-ro Mikao Usui, Kreinto de Rejkio

### Bazoj/Kredoj de Rejkio

Rejkio uzas teknikon ofte nomitan *palma kuracado* kiel formo de komplementa kaj alternativa medicino kaj estas foje klasifikita kiel *orienta medicino* fare de kelkaj profesiaj korpoj. Tra la uzo de tiu tekniko, terapiistoj postulas transdoni kuracantan energion en la formo de *ki* tra la palmoj.

Rejkio-instruo asertas ke Rejkio :


- estas neelĉerpebla
- povas indukti kuracantan efikon.

Rejkiaj Terapiistoj asertas ke:

- kiu ajn povas akiri aliron al tiu energio per agordada[6] procezo aranĝita fare de Reikia Majstro.

Rejkio estas priskribita fare de ties anoj kiel:

- Holisma terapio, kiu helpas la homon resanigante fizikajn, mensajn, emociajn kaj spiritajn malordojn.



Homaj manoj: transigantoj de kosma energio laŭ Rejkio

La kredo estas ke la energio fluos tra la manoj de la terapiisto sur kie ajn la manoj estas metitaj, aŭ tenitaj proksime de potenciala ricevanto.

Kelkaj instrumetodoj emfazas la gravecon de la intenco de la terapiisto aŭ ĉeeston en tiu procezo, dum aliaj asertas ke la energio estas tirita per la vundo/malsano de la ricevanto por aktivigi aŭ plifortigi la naturajn kuracajn procezojn. Plue, la kredo de Rejkio estas tio ke la energio estas "inteligenta", signifante ke la Rejkio scias kiujn partojn/ organojn de la korpo resanigi, eĉ se la manoj de terapiisto ne estas metitaj sur/apud la koncerna(j) korpoparto(j).




**Ĉakroj kaj meridianoj de homa korpo ludas graven rolon en energi-proceduro.**

## 6-2- Don Miguel Ruiz: Mistikismo de Toltekoj

Don Miguel Ángel Ruiz (naskita en 1952), pli bone konata kiel Don Miguel Ruiz, estas meksika verkisto de Nova-Epokaj spiritistaj kaj neoŝamanistaj tekstoj. Liaj instruoj estas signife influitaj per laboroj de Carlos Castaneda.

### Carlos Castaneda

Carlos Castaneda (angligita de *Castañeda;* 1925-1998) estis Peru-naskita amerika antropologo kaj verkinto. Komencante kun *La Instruoj de Don Juan*[7] en 1968, Castaneda verkis serion de libroj kiuj priskribas lian trejnadon en ŝamanismo. La libroj, rakontitaj en la unua persono, pridiras liajn travivaĵojn sub la kuratoreco de Yaqui "Viro de Scio" nomita Don Juan Matus. Liaj 12 libroj vendiĝis pli ol 8 milionojn da kopioj en 17 lingvoj.




**Don Miguel Ruiz, tolteka ŝamano kaj kuraculo kaj lia inspirinto/influinto Carlos Castaneda**


Li fondis Cleargreen, organizaĵo kiu antaŭenigis tensegritio[8], laŭdire tradicia Tolteka reĝimo de spirite potencaj ekzercoj.

La tolteka kulturo estas antikva mezamerika kulturo, kiu regis ŝtatan centron en Tula de Allende en la frua post-klasika periodo de mezamerika kronologio (800-1000 CE).

La posta aztekoa kulturo vidis la toltekojn kiel siajn intelektajn kaj kulturajn antaŭulojn.






**La Kvar Interkonsentoj, la ĉefverko de Ruiz aperis ankaŭ en la persan[9] kaj papere kaj cifere kaj voĉlege (akireblaj ankaŭ rete).**

## La Kvar Interkonsentoj

Lia plej fama kaj influa verko de Ruiz, *La Kvar Interkonsentoj*, estis publikigita en 1997 kaj vendiĝis ĉirkaŭ 4 milionoj da kopioj. Ĝi estis prezentita en la *Oprah* televidspektaklo, kaj rekomendas personan liberecon de interkonsentoj kaj kredoj ke ni faris kun ni mem kaj aliaj kiuj kreas limigon kaj malfeliĉon en niaj vivoj.

## Kvar Interkonsentoj

La Kvar Interkonsentoj estas:

1. Estu nepekiva/perfekta per viaj vortoj.
2. Ne prenu ion ajn persone.
3. Ne Supozemu ion.
4. Ĉiam faru vian plej multan klopodon.

## La Kvina Interkonsento

La filo de Don Miguel Ruiz poste publikigis daŭrigan verkon, *La Kvina Interkonsento*, kiu aldonas plian interkonsenton:

La 5-a interkonsento:
Estu dubema, sed lernu aŭskulti.

## 6-3- M.A. Taheri: Ringa Mistikismo

Mohammad Ali Taheri (1956-) fondinto de nova spirituala praktiko konata kiel Ring-Mistikismo, kiu i.a. estas utiligata kiel komplementa terapio por la traktado de korpaj, mensaj kaj psikaj malsanoj. La fizika korpo kaj ties resanigo/plifortigo laŭ Ringmistikismo estas plej facila/primitiva temo. Kio plej serĉatas en tiu ĉi nova skolo de irana mistikismo estas spirtuala transcendado de la homa spirito.





**M. A. Taheri bazigis sian skolon sur la irana antikva mistiksimo kaj instuoj de famaj mistikuloj kiel Rumi.**

Laŭ la sistemo, kiun li desegnis, ĉiu persono povas mastriĝi proksimume post 1 jaro, kaj se deziranta, ekinstrui ĝin al aliaj. Por kapabliĝi kuraci sin kaj aliajn sufiĉas pasigi nur la unuan klason (el la entute ok klasoj plus du paralelaj klasoj nomataj Defenda Radiado kaj Psimentologio)[10], nomata en la persa *Fara-Darmani* (Super-kuracado).

## Ideoj de Ring-mistikismo

Laŭ la ringmistikismo, tiun ĉi mondon regas du fortoj: negativa kaj pozitiva. Homo en ĉiu ajn momento povas esti nur en unu fazo, aŭ negative aŭ pozitiva. Kiam vi estas en la pozitiva fazo aŭ stato, nenio negativa povas havi malbon-efikon sur vi. Ankaŭ validas la inverso: kiam vi estas en la negativa, nenion pozitivan vi povas absorbi.

Metafizaj fortoj povas esti utiligataj kaj per la negativa kaj per la pozitiva flankoj/retoj. La celo de Ringmistikismo estas teni la disĉiplojn en la pozitiva stato kiel eble plej ofte helpe de metafizikaj fortoj pere de Ringoj al kiuj nur la disĉiploj povas konektiĝi.



**Laŭ la Ring-Mistikismo, la nunan mondon konsistigas dupolusa sistemo: pozitiva kaj negativa flankoj.**

## Super-kuracado


Super-kuracado (*Fara-darmani* en la persa) nomiĝas tiel, ĉar ringmistikistoj kredas ke pere de medikamentoj ofte oni provas nur forigi doloron/malsanon, sed pere de Fera-darmanio oni forigas la estiganton de la doloro/malsanon (ĉefe per modifado de Mondovida filtrilo, kies klarigon vi vidos sube). Plue, ili kredas fortan interagon/interefikon inter korpo, menso kaj psiko: bonfart(ig)o de ĉiu el ili bonfartigas aliajn du, kaj male, malbonfart(ig) ado de .... Ili similigas tiun ĉi trion al tripeca pilko: ĉia frapo sur kiu ajn peco, ekmovas la tutan trion (pilkon).

Ringa Mistikismo bazigas sin sur la Kosma Konscia Reto kaj pro tio nomiĝas ankaŭ Kosma Mistikismo. Pere de simpla konektiĝo kun la Reto, oni povas utiligi kuracon kaj plifortiĝon ĉu korpan ĉu mensan, ĉu psikan.

## Kiel Ni Reagas laŭ Ring-Mistikismo

Por montri sciencan aliron de tiu ĉi nova irana mistikisma skolo, kiel ekz-o, en la suba figuro ni vidas kiel ni homoj reagas al la sentataj okazaĵoj laŭ ringmistikismo:

**La individua sinteno rilate al la travivaĵoj**




**Kiel Ni Reagas laŭ Ring-Mistikismo (Scienca Aliro en Nova Irana Mistikisma Skolo)**
Fonto:Taheri, M.A., *Bineŝe Ensan* (La Homa Mondovido), Tohfe Eldonejo, 122pp., p.14, elŝutita el: www.parsbook.org.

Kiel videblas en la figuro, la Mondovida Filtrilo ludas tre gravan rolon, kaj fakte laŭ tio nia reago povas treege varii. Ĉia eraro en onies mondovido, povas estigi konflikton/kontraŭaĵon en oni, kaj sekve malsanigi onin mense kaj psike (kaj sekve korpe).

Ringmistikismo asertas ke eblas ŝanĝi/modifi tiun ĉi filtrilon kaj tiel faciligi la bonvivadon kaj transcendadon. Do ringmistikismo kredas ke tute kapablas superigi la homajn kapablojn kaj kapacitojn, kaj fizike kaj metafizike.

## Psimentologio

Tiu ĉi parto de Ringmistikismo okupigxas ĉefe pri psikaj kaj mensaj resanigado kaj plifortigado. Laŭ tiu ĉi mistikismo ĉio estas el konscio, nome enegio kaj materialo mem estas el konscio. Do per nura traktado de konscio (psiko kaj menso) oni povas efiki ankaŭ materialan korpon – kio eblas per Super-kuracado. Tamen pere de psimentologio kaj ties ringoj eblas ŝanĝi/modify ankaŭ psikajn kaj mensajn aferojn, ekz-e dormadon/sonĝadon aŭ diversajn kutimojn kaj alkutimigxojn, i.a. al narkotaĵoj kaj fumado. Ĝenerale, homoj ofte havigas al si ripetajn kutimojn, kaj sekve de tio, se iam ne eblas al ili ripeti tion, ili povas

ekhavi mensajn kaj psikajn problemojn. *Bonjad* en la persa signifas fundamenton, kaj unu el gxiaj signifoj en la persa estas tio, kun kio ĉiu novnaskito envenas nian mindon kaj ne estas genetikaĵo tra gepatroj. Psimentologio asertas, ke povas modifi la bonjadon* ankaŭ.

**2012a Defiado**

Laŭ ringmistikismo la jaro 2012 estas kiam la du flankoj (nagativa kaj pozitiva) tre klare defias unu la alian. La negativa, nome la Potenca aŭ Forta Mistikismo, provas ekregi la mondon pere de perforto kaj superigi iujn relative al aliaj, dum la pozitiva, nome Perfektema aŭ Ringa Mistikismo strebas por indukti la paceman transcendan aliron sur la homaron, kaj tiel konduki al dezirinda unueco.

**7- Konkludo**

- Ju pli ni iras malantaŭen en la historion, des pli foriĝas fiziko kaj metafiziko unu de la alia.
- En la nuna tempo ili multe proksimiĝis unu al la alia.
- Unu kialo por tio estas plivastiĝo de fiziko, dum alia kialo estas pli sci(enc)iĝo de la metafiziko
- Samo aŭ saimilo validas ankaŭ por psikologio kaj mistikismo grandparte.
- Multaj nuntempaj sciencistoj iel kaj iom mistikiĝis.
- Muktaj mistikuloj nuntempaj pli science prezentas siajn diraĵojn/trovitaĵojn.
- Espereble per homa ekipiĝo per ambaŭ ili, progresrapido de la homo plialtiĝos okulfrape.

**Kompara Tabelo**



| Fako | Kreinto/ Kreaĵo | Ĉefa ideo | Devena lando | Ekesta dato/ bazita sur | Altruismo | Kion fari por plialtiĝi |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Psikologio | Debbie Ford/ Ombra Proceduro | Ombra proceduro | Usono | 1998/ Jung | Gravigi ankaŭ aliulojn kaj la socion | Neniigi misinstruojn de aliaj |
| | Gary Zukav/ Aŭtenta Potenco | Aŭtenta Potenco | Usono | 1989/Orienta mistikismo | Gravigi sian idividuon | Ekregi sin mem sendepende de la ekstera mondo |
| Pli psikologio ol mistikismo | Esther Hicks/ Abrahamoj | Abrahamoj/ Anĝeloj | Usono | 1986/ Abrahamidaj religioj | Gravigi ankaŭ aliulojn kaj la socion | Aŭskulti al Abrahamoj |
| Pli mistikismo ol psikologio | Makao Usui/ Rejkio | Kosma energio | Japanio/ Ĉinio | 1922/ Budismo | Gravigi ankaŭ aliulojn kaj la socion | Zorgi pri egativa/pozitiva energioj |
| Mistikismo | Don Miguel Ruiz/ 4 konsentoj | 4 konsentoj | Meksikio | 1997/ instruoj de Toltekoj | Gravigi ankaŭ aliulojn kaj la socion | Forigi parazitojn kaj mem regi sian vivon |
| | M.A. Taheri/ Ringa Mistikismo | Konektantaj ringoj | Irano | Ĉ. 1980/ instruoj de irana mistikuloj kiel Rumio kaj Hafezo | Gravigi ankaŭ aliulojn kaj la socion | Eliĝi negativan fazon/eligi neorganikajn virusojn |

**Fontoj:** 1- Zukav, Gary (2010). Spiritual Partnership. Harper One. ISBN 978-0-06-145850-
2- Law of Attraction 3- Law of Attraction 4- Thought Vibration 5- Reiki, Angla elparolo: /reɪki
6- atunement 7- The Teachings of Don Juan 8- Tensegrity
9- http://novinketab.com/?GID=0FFB340425F74356BEAB3817BD8E70F9&AKH=546
10- Psik-mens-ologio, kio okupiĝas pri kuracado de psikaj kaj mensaj malsanoj.
11- http://epo.wikitrans.net/ 12- http://en.wikipedia.org/ 13- http://eo.wikipedia.org/

# La arĝento-reĝo





K. Sayadpour

*"Fi al tiu kolesterolo! Se tiu grasaĉo ne troviĝus multe en mia sango, mi ne devus tiom frumatene vekiĝi kaj sporte kuri." "Pli malbone estas tio ke mi proksimiĝas al tiu odoraĉa loko."*

*Jes. Mi kurante jam atingis la lokon kie kolektiĝas kloakoj de la kvartalo.*

*"Sed kion faras tiu homo?" Mi vidis personon eltirantan kelkajn pakaĵojn el la kloakoj, kiu ekforiris vidinte min. Estis interese. Kio estis en tiuj pakaĵoj? La afero ŝajnis stranga. Do mi reveninte hejmen telefonis al la polico kaj raportis ĉion.*

***

Pasis kelkaj semajnoj ĝis kiam tiu enigmo solviĝis. Temis pri riĉulo nomata Arĝento-reĝo. La plejmulto de la arĝento-bazaro de la lando apartenis al li. Mi legis en ĵurnalo pri lia arestiĝo. La ceteron de la eventoj mi rakontas laŭ lia intervjuo:

"Mi diplomiĝis antaŭ kelkaj jaroj pri biologio sed kiel aliaj samuloj mi ne trovis taŭgan laboron. Ekde miaj studjaroj mi sciis ke la besta retino ensorbas arĝenton por siaj funkcioj. Ankaŭ mi sciis ke la homa feko enhavas malmultan kvanton da arĝento. Do, mi metis kat-kadavron en duon-tralasiva pakaĵo kaj metis ĝin en la kloako de mia hejmo. Post dek tagoj mi prenis ĝin kaj mirinde mi trovis du arĝento -globojn en la pakaĵo. Ja tio funkciis. Do mi daŭrigis la aferon. Unue pli da katoj en mia-hejma kloako, poste en pli grandaj kloakoj kaj pli da bestoj, kaj tiel plu ĝis kiam mi sukcesis kolekti tiom multe da arĝento."

Tiel, simpla biologo fariĝis Arĝento-reĝo. Li vere kreis imperion konsistantan el multaj personoj: ĉasistoj kiuj mortigis vagabondajn hundojn, katojn kaj musojn; tiuj kiuj metis la kadavrojn en la kloakoj kaj poste prenis ilin; kaj tiuj kiuj ekstrakis arĝenton. La afero daŭris ĝis kiam leviĝis suspektoj. La oficistoj en la buroo pri vagabondaj bestoj ĉe la urbodomo miris pri granda malkresko en la nombro de tiaj bestoj. Ankaŭ aliaj arĝento-komercistoj miris de kie Arĝento-reĝo provizas sin per tiom granda kvanto da arĝento. Li nek havis minejon nek importis la mineralon. Ili raportis tion al la polico. Mia raporto ankaŭ kontribuis al la sukcesa solvo de la afero.

***

La juĝado pri lia proceso daŭris longe pro la komplika kaj ne-ordinara kazo kaj abundo de la personoj kaj instancoj kiuj iel rilatis al la afero. Mi pensas, ke li subaĉetis multajn personojn pro tio ke la fina decido estu favora al li. Jen la fina juĝo pri li:

1- La akuzito estas kulpa pro ne registrigi sian malkovron.

2- La akuzito estas kulpa pro kaŝa uzado de la kloakaĵoj, kiuj apartenas al la urbodomo.

3- La akuzito estas kulpa pro senpermesa ĉasado en la urbo.

4- Oni admiras la akuziton pro liaj utila malkovro kaj helpo redukti la nombron de vagabondaj bestoj.

La akuzito devas pagi 4 milionoj da dolaro al la ŝtata kaso kaj registrigi sian malkovron. Aldone, la kloakaĵoj apartenas al la urbodomo kaj por utiligi ilin kiel ajn oni devas akiri permeson.

Arĝento-reĝo revenis al sia regno sed ĉi-foje tute leĝe. Li pagis la pun-monon kaj registrigis sian malkovron kaj tenis la rajton por ties ununura uzo ĉe si mem.

Nun li pagas multe por uzi kloakaĵojn al la urbodomo sed ankoraŭ restas sufiĉe multa kvanto por li mem. Oni respektas lin multe ĉar la urbodomo uzas almenaŭ procenton da liaj pagoj por plibonigi la aspektojn de la urbo. Aliflanke oni apenaŭ povas trovi malutilajn bestojn kiel vagabondajn hundojn, katojn kaj musojn sur la stratoj.